# *La perua registaro esprimas ke forpardono de Fujimori ne estos nuligita.*




Limo, 2 jan (RHK) La estrino de la ministeria registaro de Peruo, Mercedes Aráoz, anoncis ke la registaro rifuzos ajnan eventualan peton de la Intermerika Komisiono pri Homaj Rajtoj (CIDH) por nuligi la forpardonon humanitaran donitan al la diktatoro Alberto Fujimori flanke de la prezidento Pedro Pablo Kuczynski.

?i esprimis ke Peruo estas obeema pri siaj internaciaj devoj, sed havas Konstitucion; kaj la Konstitucio estas eksplicita rilate al la kompetento de la prezidento transdoni forpardonojn.

La dua vicministrino asertis sian dubon pri tio ke la CIDH esprimu ke la rajto de la Konstitucio al la prezidento povas esti rebatita. Tie klare diras ke la forpardono estas kompetento de la prezidento. Punkto. Nenio alia. Tiel raportas la televida ?eno Telesur.

Dume, la CIDH fiksis a?diencon la venontan 2-an de februaro pri tiu ?i kazo.

La prezidento forpadonis la eksan prezidenton Fujimori (79-a jara) tri tagoj post kiam la fujimora grupo subtenis lin en la Kongreso por eviti ties haltigon kiel prezidento; tamen, la prezidento insistas pri tio ke la

decido obeas al la sanstato de la perua diktatoro.

La decido estigis fortan popolan rifuzon, kaj multobli?as la surstrataj protestoj sub la devizo “forpardono estas insulto”, kaj krome oni akuzas la prezidenton Kuczynski inter?an?i subtenon de la fujimora grupo kontra? promeso de forpardono.

Alberto Fujimori estis komdamnita en 2009 je 25 jaroj de karcero pro lia respondeco en la delitoj de murdo kun perfido, pligravitiga forkapto kaj gravaj vundoj, post kiam oni lin deklaris kulpa kiel intelekta a?toro de la masakroj de Barrios Altos en 1991; kaj la Cantuta, en 1992.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/151602-la-perua-registaro-esprimas-ke-forpardono-de-fujimori-ne-estos-nuligita

Radio Habana Cuba